

Johann Wolfgang von Goethe,
Elf-reĝo

tradukita de Antoni Grabowski

Kiu rajdas tra nokt', kun vent' pro l' vet'?
Jen estas patro kun infanet':
Li havas knabon en zorga pen',
Lin tenas varme en ĉirkaŭpren'.

"Filet', vi kial ekstremis pro tim'?"
"Patreto, jen! elfreg' en proksim'!
La elforeĝo, kun vost' kaj kron'!"
"Filet', ĝi estas nebulzon'."

"Ho venu do, infan' al mi!
Mi belajn ludojn ludos kun vi:
Ĉe l' bordo brilas kolora flor',
Mia panjo havas vestojn el or'!"

"Patret', ĉu vi aŭdas, ho mia patret',
Kion promesas elfreg' en sekret'?" —
"Ne timu, filet', ne timu vi,
Murmuras vent' en velka foli'."

"Knabeto bela, sekvu min',
La filinoj miaj vartados vin'.
La filinoj, lertaj en danca rond-form',
Kantante, dancante vin lulos al dorm'."

"Patret', ĉu vi vidas, patret', mia kar'?
En lok' malhela jen elfinar'!"
"Filet', filet', mi vidas precize: ²
Maljunaj salikoj ŝajnas jen grize."

"Mi amas vin, ĉarma vi, mia knabet',
Se mem vi ne iros, mi prenos sen pet'!"
"Patreto, patreto, li prenas min for!
Elfreg'o kaptas min, ho dolor'!"

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Elfregho

tradukita de Richard Schulz

Malfrua ĉeval' en nokta vent'?
La patro estas en korturment'.
Enbrake tenas infanon li,
sekure, tamen kun zorg' pri ghi.

Fileto, kial vi timas nur? -
Eksonas, paĉjo, elfa murmur'.
Jen glitas reĝo kun elfoj mil. -
Nebul' ĝi estas, mia fil'. -

"Ho, ĉarma knabo, sekvu min!
Juvelojn havas mia patrin'.
Kolorajn florojn ricevos vi,
Kaj vi ludos gaje kun papili'."

Ho patro, ho paĉjo, la elfreg'o jen!
Li logas min for al luksa festen'! -
Ne timu! Dormu, mia etul'!
Susuras arboj en la nebul'. -

"Nu venu, fajna knabo, kun mi!
La princinoj zorgos kun ĉarm' pri vi.
La princinoj dancos dumnokte en rond'
Kaj kante vin lulos en bela rotond'."

Ho patro, ho paĉjo, filinoj de l' reĝ'
Insidas tie malantaŭ la heĝ'. -
Mi bone vidas, mia filet',
De grizaj salikoj jen estas aret'. -

"Mi nepre vin bezonas por mia eskort'.
Se vi ne konsentas, estiĝu perfort'!" -
Ho patro, ho paĉjo, ve, kia krue'l!
Elfreg'o venis al sia cel'! -

...

²Mi, Manfred Retzlaff, proponas por tio, ke la rinvortoj estu – same kiel en la originale – akcentataj sur la lasta silabo, jenan ŝanĝon:

„Fileto, precize mi vida ĝin:
La grizaj salikoj jen trompas vin.“

La patro ekstremis, kun granda rapid'
 Li rajdas, kaj plende en brak' ĝemas l' id'.
 Alvenas patr' al hejma kort',
 L' infanon prenis jam for la mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Erlkönig" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).*

Arg-588-1694 (2013-02-26 14:50:24)

La patro rajdas kun granda rapid'.
 Li timas. En brak' lia ĝemas la id'.
 Li pene venas al la kort'.
 La knabon prenis jam for la mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Erlkönig" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26).*

Arg-588-1186 (2014-03-14 13:06:19)

Tiu chi traduko aperis en 1981-07-01 en la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz (Rikardo Shulco) mem. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.